n-ro 1 Aŭgusto 1986

Eldonkvanto: 4 mil ekzempleroj

**SEN NOMO** ĉar post cerbumado ni vere ne trovis allogan kaj originalan nomon por ĉi tiu ĵurnaleto.

Bonvolu elpensi brilan nomon por nia komunikilo, kaj sendu vian sugeston al nia adreso.

Ha, ne venu kun verdaj, stelozaj aŭ person-adoraj nomoj !

**AVERTO**

Nur por Esperanto-organizaĵoj: aparte sekvas klarigletero pri organizo de la Supera Konsilantaro de BEL, kaj kopio de la statuto.

# ALPAROLO

Monatojn antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto la Brazila Esperanto-Movado spertis signifan atingon: starigo de sola landa organizaĵo, kaj interkonsento pri farenda, vasta kaj ĝenerala plibonigo en ĉiuj kampoj de nia aktivado.

Krome, ni ĉiuj konscias, ke tion ni sukcesigos nur pere de konstanta kaj trafa laboro, ĉiuflanke.

Estas nun la ĝusta momento por ke ĉiu faru - racie kaj bonnivele -, ne nur la minimumon, sed la maksimumon por Esperanto.

Ĉi tie vi informiĝas pri la nuna stato de BEL, kaj pri la unuaj paŝoj jam faritaj.

Ĉi tiu informilo aperas provizore, ĝis kiam necese, kaj ĝia esenca trajto estas fariĝi ligilo inter la Estraro kaj la brazilaj esperantistoj.

Vi aŭskultos nin pere de ĝi, kaj ni vin !

La reto restu forta kaj malfermita.

La Estraro

# Al la Brazila Esperantistaro

1) Kiel antaŭvidis la aktuala statuto de BEL, okazis, kadre de la 22-a Brazila Kongreso de Esperanto, 16-20/07/86, en Curitiba-PR, elekto de la nuna estraro por la periodo 1986/1990. Jen la estraranoj:

| | |
|---|---|
| Prezidantino | : **Néia** Lúcia Souza (Brasília-DF) |
| Vicprezidantino | : **Espedita** de Castro Feitosa (Curitiba-PR) |
| 1-a sekretariino | : **Neima** Adorno (Brasília-DF) |
| 2-a sekretario | : **Carlos Maria** (Brasília-DF) |
| 1-a kasisto | : José Carlos **Dorini** Ramos (Brasília-DF) |
| 2-a kasisto | : **Adolpho** de Miranda Silva (Brasília-DF) |
| Direktoro | : **Ciro** Gomes de Freitas (Cuiabá-MT) |
| Direktoro | : **Itacir** Luchtemberg (Curitiba-PR) |
| Direktoro | : **Jair** Salles (Rio de Janeiro-RJ) |
| Direktoro | : **Josias** Ferreira Barboza (Brasília-DF) |

La 31-an de julio okazis la enposteniĝo, en la propra sidejo de BEL (antaŭa sidejo de BKE), en Brasília.

La platformo sur kiu la ekipo laboras, konsistas el la sekvaj punktoj:

- antaŭenigo de la unuiĝo de la Brazila Esperanto-Movado, laŭ federacia sistemo;
- prilaboro de konvena statuto, surbaze de forumo de la brazila esperantistaro;
- laboro por havigi taŭgan sidejon por BEL;
- modernigo de la tuta laborstrukturo de BEL;
- prizorgo de eventoj por la Centjaro de Esperanto.

2) Translokiĝo de BEL al Brasília:

08/08/86 - Néia, Dorini kaj Neima alvenis en Rio-n por transpreni la koncernajn administrajn kaj financajn taskojn, transdonitaj pere de la antaŭa BEL-Prezidanto (Nelson Pereira de Souza), kaj tieaj kunlaborantoj.
Efektiviĝis la translokiĝo de BEL-havaĵoj, nome: la tuta biblioteko, la libroservo, dokumentoj, arkivoj, portretoj, k.s. Ĉio bonorde atingis Brasília-n, la 13-an de aŭgusto.

Situacio en Rio de Janeiro - la domo restas sub la respondeco de BEL. Mebloj estos vendotaj, escepte de kelkaj kiujn BEL donacos al loka Esperanto-grupo, jure organizita, kiu kandidatos al uzo de la tieaj ĉambroj.

Situacio en Brasília - la fizika spaco de la sidejo de BEL enhavis la tutan transportaĵon, sed mankas taŭgaj ŝrankoj por surbretarigi la bibliotekon kaj aliajn dokumentojn.
Buĝeto por mendo de konvenaj bretaroj estas esploratai.

Nuna laboro - estraranoj kaj kunlaborantoj faradas la tujan organizan laboron: ordigo de leteroj, de dokumentoj, arkivado, selekto de materialo, purigado, kunordigado de BEL/BKE informoj, adresaroj, k.s. Samtempe ni respondas urĝajn leterojn, kaj ekprenas kontaktojn kun eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj.

GRAVE - ni restrukturigas kaj ampleksigas la libroservon. Baldaŭ librokatalogo atingos vin !

Financa situacio - la pozitiva saldo de la kunfanditaj organizaĵoj sufiĉis por pagi la elspezon de la translokiĝo kaj la unuajn diversajn elspezojn.

Centjaro de Esperanto - ni ricevis 23 mil kruzadojn, kiuj apartenis al NEK, por la centjara laboro.

3) SERVOJ

- aliĝo al BEL: ankoraŭ validas la antaŭaj kriterioj (flava aliĝilo);
- aliĝo al UEA kaj abono de revuoj: same;
- eldono de la revuo Brazila Esperantisto: provizore ĝi ne plu aperos, ĝis starigo de redaktogrupo kiu ekskluzive respondecos pri ĝi, laŭ difinotaj reguloj;
- koresponda kurso: ekde aŭgusto ni ne plu akceptas novajn lernantojn. Laborgrupo estas starigita por elekti kaj/aŭ prepari instrumaterialon kaj metodon por starigo de moderna kaj efika korespondа kurso en Brazilo.
Aliĝintoj ĝis julio pasinta, ricevas akompanon de la instruistoj ĝis ilia diplomiĝo.

ATENTU: de nun, por kontakti LIGO-n, skribu al:

Brazila Esperanto-Ligo - BEL
SCS Ed. Jockey Club, sala 103
70300 Brasília - DF

aŭ

Caixa Postal 11-1105
70084 Brasília - DF
Telefon-nro: (061) 226-1298
Prefere voku en tiu horaro: 19:30/22:00 h